

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 5 oktobro/novembro/decembro 1987



31. GEFA-Jahresversammlung 9. bis 11. 10. 1987 in Ingolstadt



Stadtmitte

Fotoj: Ullmann

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplanan Novan Jaron.

Harmonia jarkunveno de GEFA en Ingolstadt

Pli ol 90 esperantistaj fervojistoj, inter ili eksterlandaj gastoj el Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Svislando, sekvis la inviton al la 31a jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA). Gastiganta urbo de la 9a ĝis la 11a de oktobro 1987 estis la bavara danuba urbo Ingolstadt. La bavara televido elsendis televidan intervjuon.

Ĉe la stacidomo flirtis Esperanto-flagoj kaj funkciis tie akceptejoj, kiu transdonis la kongresdokumentojn. Vendredon posttagmeze la urbestro, mem filo de fervojisto, bonvenigis en la pompa salonego de la urbodomo la alvenintojn kaj donis resumon pri la historiĉa urbo, kies ekonomia graveco baziĝas ekde kelkaj jardekoj precipe sur la produktado de altkvalitaj aŭtomobiloj. Oni fieras pro la konservita urbokerno kun ĝiaj multnombraj frontonaj domoj, kiuj respegulas solidan civitanecon. La urbestro emfazis pri la neceso de komuna lingvo kaj deziris sukceson por la laboro de la esperantistaj fervojistoj. Post reciproka interŝanĝo de donacoj la ĉeestantoj estis regalitaj.

La kongresanoj povis konvinkiĝi la sekvan matenon dum la gvidita rondirado, kiel bele aspektas la vidindaĵoj, inter ili la malfrugotika katedralo Je nia bela Sinjorino kaj la baroka preĝejo Maria de Victoria. Kiel kongresejo servis la centre situanta Kolping-domo. Tie oni renkontis siajn geamikojn, manĝis kaj trinkis komune kaj aĉetis librojn el la granda stoko de la Esperanto-Centro Paderborn.

En du laborokunsidoj la GEFA-estraro traktis kun la distriktaj kaj specialaj komisiitoj multnombrajn temojn: analizo de la aktivaĵoj dum la centjara Esperanto-jubileo, telekurso, verbkampanjo, esperantigita fervoja fakterminaro, tradukita fervoja konvencio, estontaj aranĝoj naciaj kaj internaciaj ktp. La reprezentanto de la Fervoja Socialorganizo (ĉefestraro) partoprenis kun granda intereso la diskutojn kaj ilustris la problemojn de la fervojista agado. Sabaton posttagmeze la kongresanoj faris aŭtobusekskurson al la valo de la Altmühl-rivero ĝuante la tradician belegan veteron. Ili admiris la plej grandan fagon en Bavario kun sia grandioza foliaro. Pli grandan impreson postlasis la flugprezentado de kaptobirdoj sur la kastelo Rosenberg (Rozkastelo). Falkoj, vulturoj kaj agloj flugis

supren, ŝvebis kaj rapide ĉasis ŝajnobjektojn. Altiris ankaŭ la falkeja muzeo interne de la kastelo. En la apuda vilaĝo Riedenburg interesuloj povis admiri la eksponitan, plej grandan kristalon el vitrovida kvarco, 3 metrojn longan kaj preskaŭ 8 tunojn pezan.

La festvespero okazis en la spegulsalonego de la kongresejo. Post enkondukaj salutoj de Clemens Lenz (Munkeno), la GEFA-prezidanto Joachim Giessner salutis la kunvenintojn kaj precipe la honorgastojn de la urbo, Fervoja Socialorganizo kaj sindikato, kiuj siaflanke bonvenigis, parte eĉ esperantlingve, la kongreson. Por la eksterlandaj asocioj transdonis siajn salutojn:

Greta Gössl (Aŭstrio)
Lucien de Sutter (Belgio)
Maria Angelova (Bulgario)
Jiří Pištora (Ĉeĥoslovakio)
d-ro Stefano Bacskaĵ (Hungario)
Otto Walder (Svislando) krome
Hermann Schmid por Bavara
Esperanto-Ligo

Laŭdindaj estas la kontribuadoj de la arĉinstrumenta kvarteto de la Fervoja Socialorganizo München, kiu ludis klasikajn muzikaĵojn. Speciala ĝuo estis aŭskulti la bulgaran soprankantistinon Maria Angelova. El sia riĉa repertuaro ŝi prezentis per sia nuancoriĉa voĉo esperantigitajn (traduko de Joachim Giessner) kantojn kaj ariojn.

Kiel lastjare la tombolo favore al la eldonota terminaro tradukita paralele al la fervojfaka terminaro de UIC renkontis bonvoleman aĉetantojn. 490 germanaj markoj povis esti disponigitaj al la fundoso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Dankon pro tiu ekzempla iniciativo.

La oficialan parton de la festvespero sekvis balo. Ĝis post noktmezo la dancparoj turniĝis sur la parkedo laŭ viglaj ritmoj.

Denove la kongresanoj kolektiĝis en la spegulsalonego por la dimanĉa matineo. Kulmino de la varia programo estis la jarraporto de la GEFA-prezidanto. La resumita teksto troviĝas aliloke en tiu eldono. Alia prelego, same de s-ro Giessner, traktis „Esperanto – 100 jaroj de internacia kulturo kaj la kontribuoj de la fervojistoj al tio“. S-ino Kruse iama GEFA- kaj IFEF-estraranino rakontis pri sia multjara agado kiel UEA-delegitino, okupo kiu postulas multnombrajn, ofte ankaŭ nekutimajn engaĝiĝojn. S-ro Lautenbach montris du rimarkindajn DB-sonfilmojn. Unu okupiĝis pri la historio de la germanaj fervojoj ĝis la 150jara jubileo en 1985. En la alia filmo estis montrataj turismaj juveloj en la FR Germanio. Aparta surprizo estis la Esperanto-

marŝo komponita komence de tiu jarcento, ludita en la dudekaj jaroj, perdiĝinta, ĝis kiam s-ino Kruse retrovis ĝin. La belsona melodio valoras esti ekde nun ludata pli ofte. La soprankantistino Angelova aŭdigis ankoraŭfoje plurajn sentoplenajn kanzonojn en Esperanto kaj bulgarlingve. Entute bonkvalita programo.

Post la komuna tagmanĝo oni adiaŭis kun la promeso partopreni la venontan GEFA-jarkunvenon, kiu okazos en oktobro 1988 en Kaiserslautern. Ĉiuj, kiuj kontribuis al la sukcesplena jarkunveno estu kore dankataj ĉi tie pro ilia laboro, precipe s-ro Lenz, la komisiito por la distrikto München, kaj lia helpanto s-ro Weidacher.

W.B.

Vortoj de prezidanto Giessner en la matineo Kontemplado pri la pasinta jaro

Jes, jen la temo: kontemplado. „Jubileoj ne ĉesas.“ Tiel komenciĝas la ĉi-jara jarraporto, kiun vi legas en tiu ĉi Bulteno. Jubileoj en 1984 – 75 jarojn IFEF, en 1985 – 75 jarojn GEFA, en 1986 la 30a jarkunveno, ĉi-jare nia lingvo vivas cent jarojn, en 1988 la 40a IFEF-kongreso. Tio estas nuraj ciferoj. Sed kiaj amasoj de ideoj, klopodoj, streĉoj, laborego kaj laboremo – kaj oferoj ĉiuspecaj kaŝiĝas malantaŭ tiuj krudaj ciferoj! Legu atente niajn jarraportojn, legu la specialan numeron de „Bulteno“, aperintan en 1985; informu vin en la Esperanto-gazetaro pri ĉio, kio okazas en la Esperanto-mondo, kaj vi rimarkos, ke la situacio de la Internacia Lingvo en la jaro de ĝia jubileo montras, ke la klopodoj de sennombraj sindonemaj esperantistoj ne estis vanaj. Ni, la fervojistaj esperantistoj rajtas pretendi, ke dum preskaŭ 80 jaroj ni forte kontribuis al tiu situacio, unuavide sur faka tereno, sed ne pretervideble ankaŭ en la kultura sektoro. Pro tio ni kunfestu ĝoje kaj bonkonsciencie la grandan eventon de la esperantistaro.

Kaj jam ni estas meze en la „temo“, la kontemplado pri la pasinta jaro, pri la jubilea jaro de Esperanto. Kaj kion alian tiu kontemplado povus koncerni ol la jubileon mem. Certe oni devas demandi sin, ĉu ĝi, la jubileo, iamaniere montris kaj pruvis – akre formulite – la ekzistaraĵon de la lingvo Esperanto, ĉu ĝi povis prezenti promeso-

plenajn perspektivon por la dua jarcento. Tio certe estas demandoj, je kiuj ni, la nuntempaj adeptoj de d-ro Zamenhof, bezonas respondon.

Tutklare la jubileo antaŭĵetis siajn signojn en formo de mondvastaj ĉiuspecaj preparoj flanke de la esperantistaro, per abundo da artikoloj, eldono de broŝuroj kaj libroj, aranĝado de jubileaj kunvenoj, el kiuj unu el la tre gravaj estis nia kongreso en Katowice. Ĝi kvazaŭ malfermis la vicon de la plej elstaraj festaj eventoj en la jubilea jaro, kiujn sekvis aro da aliaj, de SAT en Boulogne, de NEM en Graz, de blinduloj kaj kristanoj kaj aliaj kaj fine la Universala Kongreso en Varsovio. Kaj nur, kiu rigardas tiun tutajon kiu travivis tiun gigantan kongreson, tiun „manifestacion pri miraklo“, kiel skribas la revuo „Esperanto“, tiu povas respondi la demandon pri ekzistaraĵo de nia lingvo per nelimigita „jes“. Nur, kiu ĉeestis la inaŭguron de tiu vere historia kongreso; kiu aŭskultis la vojindikan festparoladon de la UEA-prezidanto d-ro Tonkin; kiu aŭdis la vortojn de la prezidanto de la pola parlamento kaj alta protektanto de la kongreso, kiu formulis „via movado fariĝis ankaŭ la mia“; nur kiu observis tiun formikejon da 6000 homoj de ĉiuj koloroj dum tuta semajno, tiun nekredoblan amasiĝon de movadaj, fakaj, kulturaj programeroj kun iliaj altaj postuloj al la lingva nivelo de la kongreso, kaj sekve de la

esperantistoj, nur tiu povas respondi: „Jes, Esperanto fariĝis vivanta lingvo ĉiamaniere uzebla, kiu neniam pli klare pruvis sian ekzistorajton ol ĝuste en tiu kongreso.

Kaj el tiu konstato oni rajtas konkludi, ke oni ankaŭ la perspektivojn por la dua jarcento rajtas prijuĝi optimisme, se la esperantistaro sukcesos adaptiĝi al la modernaj sistemoj de komunikado kaj informado; se ĝi pli ol ĝis nun ĝenerale pretos elpaŝi el sia fermita cirklo. „Venos nun la periodo de disvastigo“, diris d-ro Tonkin. Kaj li ankaŭ diris, ke „la lingvo ekzistas unue por disvastigi ĝin, due por ĝui ĝin.“

Ŝajnas al mi, ke sub tiaj premisoj ankaŭ ni, la fervojistoj, povos kontribui nian parton, por ke la dua jarcento alportu la deziritan kaj necesan progreson. Jam ĝis nun ni neniel devis honti pri la rolo, kiun la fervojista movado ludis en la historio de la Esperanto-movado entute. Sed vojo kaj devizo estas klaraj: disvastigo, kio samtempe signifas serĉi kaj trovi – kaj firmteni novajn adeptojn.

Ni ne forgesu la malnovan saĝecon, ke homaj pensoj povas esti tre fortaj. Ni ne

pretervidu, ke d-ro Zamenhof bone sciis tion, kiam li donis al sia lingvo krom ĉio alia ankaŭ la „Internan Ideon“. Jen mi ripetas, kion mi diris en Katowice: „Ankaŭ nuntempe ekzistas esperantistoj, kiuj opinias tiun internan ideon naiva, infaneca, superflua. Sed la Internacia Lingvo kaj ĝiaj adeptoj ĉerpis siajn fortojn kaj ankoraŭ ĉerpas ĝuste el tiuj spiritalaj radikoj de Esperanto. Nur ili donas energion, emon, kapablon por aktive utiligi tiun mirindan interhoman ligilon kaj precipe, por aktive progresigi ĝin.“

Ni kunligu la fortojn kreskantajn el tiu interna ideo, kiu estas nun same necesa kiel antaŭ cent jaroj, kun la aktivecoj de modernaj homoj. Kaj la pozitiva rezulto certe ne mankos. Se ni ĉiuj, kiuj aŭdas aŭ legos tion, agos en tiu senco, ni ne bezonas timi la pluan evoluon de nia lingvo. Vere dependos dela sintenado de la esperantistoj, de ilia plua oferemo, sindonemo, prudento, obstino kaj ne laste pacienco, kiun sorton havos la Internacia Lingvo en sia dua jarcento. Ni ĉiuj helpu!

J. Giessner

Jarraporto pri la periodo inter la 30a kaj 31a jarkunvenoj (1986/87)

Enkonduko

Jubileoj ne ĉesas. En 1984: 75 jarojn IFEF, en 1985: 75 jarojn GEFA, en 1986: la 30a jarkunveno, ĉi-jare nia lingvo vivas cent jarojn, en 1988: la 40a IFEF-kongreso. Tio estas nuraj ciferoj. Sed kiaj amasoj da ideoj, klopodoj, streĉoj, laborego kaj laboremo –kaj oferoj ĉiuspecaj kaŝiĝas malantaŭ tiuj krudaj ciferoj! Legu atente niajn jarraportojn, legu la specialan numeron de „Bulteno“, aperintan en 1985; informu vin en la Esperanto-gazetaro pri ĉio, kio okazas en la Esperanto-mondo, kaj vi rimarkas, ke la situacio de la Internacia Lingvo en la jaro de ĝia jubileo montras, ke la klopodoj de sennombraj sindonemaj esperantistoj ne estis vanaj. Ni, la fervojistaj esperantistoj rajtas pretendi, ke dum preskaŭ 80 jaroj ni forte kontribuis al tiu situacio, unuavice sur faka tereno, sed ne pretervideble ankaŭ sur la kultura sektoro. Pro tio ni kunfestu ĝoje kaj bonkonscience la grandan eventon de la esperantistaro.

Malgaje ni registras, ke denove la morto rikoltis en niaj vicoj. Ni funebras pri

Albert Rehwinkel (88)	majo 86
Hans Bögner	aŭg. 86
Alfred Pongratz (74)	9.2.87
Josef Hug	20.2.87
Friedrich Maurer (65)	10.4.87
Wolfgang Zietz (49)	18.9.87

Ili ripozu en paco!

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostatato

La evoluo de la pasintaj jaroj daŭris, la nombro de individuaj membroj malkreskis de 455 al 445, inter kiuj mankas junuloj. Jen la plej granda problemo. Al IFEF ni pagis por 684 membroj inkl. la korporativajn. Tio donis al ni rajton je 4 komitatanoj.

1.2 Kursoj

Ne eblas komentarii tiun punkton, ĉar la

indikoj anoncigitaj per la distriktaj demandiloj estas kvazaŭ nulo. Bv. relegi la komenton sub 1.2 en la pasintjara jarraporto.

La telekurso post la malfacilaĵoj kaŭzigitaj de la subita morto de L. Kuhn denove regule estis ricevebla en 1987. Mendis ĝin ĝis nun pli ol 180 personoj. Aliaflanke nur parto el ili vere prilaboris la tutan kurson, kaj eĉ pli malmultaj membriĝis ĉe GEFA. Jen vasta kampo por „individua prizorgado“ de la respektivaj personoj, kies adresoj ĉiam estas sciigataj al la distrikt-komisiitoj.

1.3 Kunlaborantoj

La laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß) Esperanto (Gießner, Graß, Riehn) kunvenis dufoje kun la komisiitoj en Duisburg (oktobro) kaj Fulda (marto). La ĝisnuna distrikt-komisiito en Essen, Manfred Retzlaff, transdonis sian oficon al Rolf Terjung.

2. Kunlaboro kun IFEF

En la 39a IFEF-kongreso (Katowice) partoprenis nur 23 germanaj kolegoj kaj familiaj, kvankam ĝi okazis la unuan fojon en Pollando kaj krome okaze de la centa jubileo de la lingvo. Estis ĉiukaze instruaj kaj interesaj tagoj. GEFA estis reprezentita de la komitatanoj Graß, Herlitze, Riehn kaj Ritterspach. Por la Fakprelega kaj Terminara Komisionoj estis elektita Gernot Ritterspach sekretario por FK kaj gvidanto por TK. Konfirmata kiel redaktoro de „Terminara Kuriero“ estis H. Dieter Hartig. Al la programero „Aktualaĵoj el diversaj landoj“ kontribuis G. Ritterspach per referatoj pri manovrad-helpiloj kaj pri „Euro-City“. J. Gießner kaj O. Rösemann partoprenis en la IFEF-estrarkunvenoj en marto en Naestved (DK) kaj en oktobro en Schulerberg (D). Kiel jam de jaroj la Terminara Kuriero estis eldonita kaj dissendita de Hartig. Ĝi estas unu el la kaŭzoj, kial la laboro en la TK konsiderinde progresis en la pasintaj jaroj. En la fervojista kontaktkunveno en UK Varsovio prelegis J. Gießner pri la kontribuo de la fervojistoj al la Esperanto-kulturo.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 30an jarkunvenon de GEFA en Duisburg de la 17a ĝis 19a de oktobro 1986 ĉeestis 127 personoj, inter ili amikoj el 8 aliaj landoj (v. n. ron 5/86). Multaj membroj partoprenis en aliaj naciaj kaj internaciaj okazintaĵoj, ekz. en la UK Varsovio, IFEF-skisemajno en Sarajevo, jarkunveno kaj ktp.

4. Informado, varbado

4.1 Bulteno

„Bulteno“ aperis kvinfoje (5/86 ĝis 4/87), el ili kvar numeroj pagitaj de BSW, unu kiel propra eldonaĵo de GEFA. Entute aperis 38 paĝoj kun 7 fotoj. Kelkajn malfruigojn kaŭzis la presejo, ne la redaktoro.

4.2 Gazetaro

Laŭ indikoj liveritaj de la distriktoj ni konstatis 66 artikolojn en la taga gazetaro, en fakaj kaj sindikataj revuoj kaj en oficialaj informiloj de DB. Pli kaj pli distrikt-komisiitoj utiligas la distriktajn „BSW-Mitteilungen“, por informi pri la agado de la fervojistaj esperantistoj kaj por konatigi la programojn de la grupoj.

4.3 Varbado, informado

Ni distribuis 2100 informilojn al deĵorejoj, sindikatoj, faklernejoj kaj unuopuloj. Krome estis elpendigitaj pli ol 50 afiŝoj. Estis aranĝitaj 3 ekspozicioj en Duisburg kaj Bremen. Dank' al klopodoj de Willi Barnickel en la UEA-jarlibroj 1986 kaj 1987 troviĝas po unu tutpaĝa anonco de DB pri prezfavoroj. Kaj ankaŭ la DB-informilo „Inter-Rail“ daŭre mencias la pasportan servon de TEJO. Grava estis la fondo de „Komisiono por varbado/informado“ en la kunsido de estraro/komisiitoj en Fulda 14.3.1987. Membroj estas Egon Kiefer kaj Siegfried Krüger sub gvidado de Klaus Böhnke. Tiel finfine estas forigita la longjara manko de komisiito por tiu kampo. Estos komplika tereno, kiun devos pritrakti tiu komisiono. Ni deziras, ke ĝi nasku multajn taŭgajn ideojn, por ke ni povu solvi nian ĉefproblemon: havi novajn membrojn. Sed same grava, eĉ pli, estos, ke la tuta membraro pli ol ĝis nun sur tiu kampo aktivigos.

4.4 Aliaĵoj

Fakaj prelegoj estis faritaj pri diversaj temoj en Bremen, München kaj Potsdam. La urba Esperanto-prospekto de Duisburg estis dissendita al multaj landoj. La fervoja faklernejo en Hamburg ofertas Esperanto-kurson. En Frankfurt, Mainz, Köln kaj Hamburg okazis informado en deĵorejoj resp. okaze de distriktaj BSW-kunvenoj, tre rekomendinda por imiti. GEFA-prez. Gießner tradukis libron de la germana verkistino Gudrun Pausewang „La lastaj infanoj de

Oldrovalo“ kaj lingve reviziis el la sveda lingvo tradukitan libron de Astrid Lindgren „La Fratoj Leonkoro“. Ambaŭ estas interesaj, ekscitaj libroj kun nepretervideblaj paraleloj al la nuntempo, taŭgaj por mem legi kaj kiel donacaĵoj por amikoj. Ili aperis kiel kontribuaĵoj al la jubilea jaro de Esperanto (mendebaj ĉe J. Gießner).

5. Emerituloj

La 5an de septembro kunvenis la emerituloj en Göttingen. Kiel ĉiam Elfriede Kruse preparis kaj gvidis la renkontiĝon, kiun partoprenis 40 personoj. Ĉiufoje oni povas konstati, kiel necesaj estas tiuj renkontiĝoj ĝuste por la maljunaj membroj, kiuj ne plu kapablas fari longajn vojaĝojn al kongresoj. Tre dankaj ili estas, kaj danko estu al la ĉefestraro de BSW, kiu ĉiujare konsiderinde kontribuas al la sukceso de tiu aranĝo.

6. Perspektivo

Ni revenu al la konkondukaj vortoj de tiu ĉi jarraporto, kaj post la jubilea festado ni vidu antaŭ ni la taskojn de la estonteco. Por ilustri ilin, mi citu vortojn, kiujn la prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, diris en sia inaŭgura festparolado en la UK Varsovio: „Ni kreis murojn ĉirkaŭ ni: sekuraj en niaj kluboj kaj kongresoj, ni ne alfrontas la publikon, ni ne agas sufiĉe discipline kaj celkonscie... Mi simple faras tiun ĉi konstaton: ke la lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui. Fofoje ni inversigas tiun ordon kaj forgasas nian veran celon“ (fino de citaĵo).

Jen niaj taskoj komence de la dua jarcento de nia lingvo. Ek do! Ni havu antaŭ niaj okuloj la finan celon: la transdonadon de la Internacia Lingvo al la homaro kiel al ĉiuj komunan interkomprenilon. Ni ekkonu, ke estas ni, kiuj devas transpaŝi la „murojn“, pri kiuj parolis d-ro Tonkin; ke estas ni, kiuj devas forlasi malnovajn metodojn kaj devos adaptiĝi al la modernaj metodoj pri informado kaj propagando, almenaŭ laŭ niaj modestaj eblecoj. Ni konsciiĝu, ke ni havas la taskon, zorgi, ke nia lingvo sendifekte, bone funkciante kaj plidisvastigite estos donata al venontaj generacioj en la senco de d-ro Zamenhof. Ni faru **tiun** donacaĵon al li pro la centa naskiĝjaro de lia kaj nia lingvo!

kompilis: Gießner

Jarkunveno Ingolstadt 1987 Mallonga parolado de la prezidanto sabaton vespere

Ni aŭdis ĝentilajn salutvortojn de niaj gastoj. Ĉar certa nombro de neesperantistoj estas inter ni, mi menciui ĉi-okaze la por ni plej gravan eventon de la jaro, nome la centjaran jubileon de nia lingvo. Permesu, ke mi faros tion en germana lingvo.

Sehr verehrte Gäste, die des Esperantos nicht mächtig sind!

Ich möchte nicht versäumen, Sie am heutigen Abend besonders auf ein Ereignis aufmerksam zu machen, das für uns Esperantisten von großer Bedeutung ist:

Im Jahre 1887 nämlich hat der polnische Augenarzt Dr. Zamenhof seine Sprache „Lingvo internacia“, die dann den Namen „Esperanto“ erhielt, der Öffentlichkeit übergeben. Mithin ist die Sprache nunmehr 100 Jahre alt und hat alle Widerstände und Widerwärtigkeiten, die sich ihr in den Weg stellten, gemeistert. Das waren vor allem die beiden Weltkriege und die bis zu Konzentrationslager und Todesstrafe reichenden Verfolgungen durch autoritäre Regime in West und Ost, aber auch Arroganz, offene Gegnerschaft oder Totschweigen von vielen Seiten.

Zur Feier dieses hundertsten Geburtsjahres haben die Esperantisten in der Welt Treffen veranstaltet. Auch wir Eisenbahner haben deshalb unseren alljährlichen internationalen Kongreß in diesem Jahre im Geburtsland von Zamenhof, in Kattowitz in Polen abgehalten. Und im Sommer kamen 6000 Anhänger der internationalen Sprache in Warschau eine Woche lang zusammen, um in einer imponierenden Manifestation zu feiern und zu zeigen, was diese Sprache auf allen Gebieten, wo Sprache gebraucht wird, zu leisten imstande ist. Dieser Weltkongreß hat, wie schon manche derartige Veranstaltung vor ihm, in erhöhtem Maße bewiesen, daß Esperanto sich zu einer lebenden Universalsprache entwickelt hat, die allen Anforderungen gerecht wird und allen Menschen des Erdballs zu aller Vorteil zu Diensten sein möchte und könnte. Man müßte sie nur endlich allgemein akzeptieren.

Aus den Bezirken

Essen/Duisburg

Karl-Heinz Kersting, Essen, pflegt seit Jahren regen Kontakt mit der Partnerstadt Tampere/Finnland. Er erinnerte an Wilhelm-Heinrich Trompeter, der von 1839 bis 1901 lebte und im Kohlenbergbau tätig war. Als Zamenhof finanziell am Ende war, sprang Trompeter als Mäzen der ersten Esperanto-Zeitung ein, die vom Niedergang bedroht war. Zamenhof rühmte dieses Engagement mit dem Zitat: „Daß unsere Sache lebt und blüht, ist zu einem sehr großen Teil sein Verdienst“.

Die BSW-Mitteilungen des Bundesbahn-Sozialwerk Essen, 2/87, veröffentlichten einen Beitrag des Bezirksbeauftragten für Esperanto, Rolf Terjung, auf der Titelseite „100 Jahre Esperanto“, der Einblick in die Esperantogeschichte gibt und die Vereinigung der deutschen Eisenbahner- Esperantisten im BSW (GEFA) als kulturelle Pflegestätte hervorhebt.

Im Sprachenprogramm der Volkshochschule Duisburg wird ab Herbstsemester 1987 ein Esperanto-Kurs für Anfänger angeboten.

Außerdem veranstaltete die Esperantogruppe Duisburg vom 30. 9. bis 3. 10. eine „Große Esperanto-Ausstellung 100 Jahre Esperanto“ in der Zentralbibliothek Duisburg.

Die örtliche Presse „Neue Ruhrzeitung (NRZ)“ und „Westdeutsche Allgemeine Zeitung (WAZ)“ veröffentlichen regelmäßig Artikel über Esperanto.

Nekrologo

La 13an de aŭgusto forlasis nin
Helmut Seidel (72)

el Bremen.

Li estis membro de la loka
GEFA-grupo kaj subtenis nian
agadon.

Li jam lernis Esperanton kiel
junulo en la lernejo.

Ni profunde bedaŭras lian
forpason kaj kondolencas
sincere al lia edzino.

Seniorentreffen in Göttingen

Mehr als 40 Senioren folgten am 5. September 1987 der Einladung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten zu einem eintägigen Treffen in Göttingen. Im eleganten Gebhardshotel, nahe am Bahnhof, begrüßte Frau Kruse im Namen des BSW die erschienenen Gäste, von denen einige sogar aus Berlin und Süddeutschland gekommen waren. „Dienstjüngster Pensionär“ war Herr Lautenbach aus Fulda, der bei dieser Gelegenheit über den von ihm geleiteten Fernkursus berichtete. Frau Kruse schilderte ihre Eindrücke als Begleiterin einer US-Teilnehmergruppe beim diesjährigen UEA-Kongreß in Warschau. Über den IFEF-Kongreß in Katowice berichtete Herr Barnickel. Er lud auch zur GEFA-Jahresversammlung 1987 in Ingolstadt sowie zum IFEF-Kongreß 1988 in Perpignan ein.

Nach einem reichhaltigen Mittagessen begaben sich die Teilnehmer zu einem Rundgang durch die romantische Altstadt, reich an Fachwerkbauten. Die zahlreichen jungen Leute in der Fußgängerzone erinnerten daran, daß Göttingen eine Universitätsstadt mit berühmter Vergangenheit ist. Anschließend genossen die Senioren einen gemütlichen Kaffeepausch, ehe sie die Heimfahrt antraten. Herzlichen Dank an Frau Kruse für die vorbildliche Gestaltung der Tagung. Im nächsten September wird man sich wieder treffen, wahrscheinlich in Koblenz.

W. B.

Frankfurt/Main

Esperanto im Hessischen Rundfunk
Sechs Esperanto-Freunde, darunter auch unsere Mitglieder Dr. Ortwin Brodt und Walter Ullmann, stellten am 15. 07. 1987 in der Radiosendung „Freizeitpaß“ in HR 1 Esperanto vor.

Männer und Frauen aller Altersgruppen und sehr unterschiedliche Berufe waren dabei repräsentiert.

Von 19.30 Uhr bis 21.00 Uhr konnten die Sechs in dieser landesweit ausgestrahlten Sendung erzählen, wie sie zur Internationalen Sprache gekommen sind.

Fortsetzung Seite 12

Wir trauern um den langjährigen
Vorsitzenden des
BSW-Hauptvorstands,

Ministerialrat a. D.

Walter Kühne,

verstorben am 20. 10. 1987
im Alter von 76 Jahren.

Wir haben den Hinterbliebenen
unser Beileid ausgesprochen.

GEFA

Ministerpräsident Späth:

Esperanto hat praktischen Wert.

Aus Anlaß des 100jährigen Jubiläums von Esperanto hat Ministerpräsident Lothar Späth in einem Grußwort an den Esperanto-Verband Baden-Württemberg die Internationale Sprache gewürdigt. Wir zitieren aus der Zeitschrift „Esperanto in Baden-Württemberg“ 4/87:

Die biblische „babylonische Sprach-Verwirrung“ war eine Strafe Gottes. Eine Strafe deshalb, weil keiner mehr des anderen Sprache verstand und die Menschen nicht mehr miteinander sondern aneinander vorbei redeten.

Obwohl wir heute die Vielfalt der Sprachen zu Recht auch als kulturellen Reichtum begreifen, hat sich an der prinzipiellen Richtigkeit jener negativen Darstellung der Sprachverwirrung nichts geändert. Denn das erste Hindernis zu jeglicher Völkerverständigung und damit zum Frieden ist und bleibt die unterschiedliche Sprache, die es vielen Menschen verwehrt oder zumindest erschwert, den unmittelbaren Kontakt zu anderen Völkern zu finden. Nicht miteinander reden zu können ist prinzipiell friedensfeindlich.

Das ist der Ansatz von „Esperanto“. Ludwig Zamenhof, der „Erfinder“ von Esperanto, hat die Idee einer internationalen Sprache in die Tat umgesetzt. Er wollte die Sprachmauern einreißen und veröffentlichte 1887 das erste einschlägige Lehrbuch, Ergebnis eines hohen Maßes an Kreativität und Schaffenskraft.

Die Esperanto-Bewegung hat sich kontinuierlich ausgebreitet. In immer mehr

Ländern wird die „Kunstsprache“ gelernt und gelehrt. Esperanto ist längst kein idealistischer Selbstzweck mehr, sondern hat praktischen Wert gewonnen. . .“
Aus „Esperanto Informationsdienst“ 3/87.

Termine

Am 19. 3. 88 treffen sich der Arbeitsausschuß und die Beauftragten für Esperanto zu einer gemeinsamen Sitzung in Fulda.

Das Seniorentreffen 1988 ist für den 3. 9. im Bezirk Köln geplant.

Vom 7.–10. 10. 1988 findet die Jahresversammlung im Bezirk Saarbrücken (voraussichtlich in Kaiserslautern) statt. Mit Bulteno 2/1988 wird zu der Veranstaltung eingeladen.

Dem Bulteno sollen möglichst die Anmeldevordrucke beigelegt werden.

Für 1989 wird der Bezirk Hannover zur JV einladen.

Jartransiĝo

Veninta estas nun la fin'
de l' jar'; ĝi proksimigis nin,
kun ĝojo kaj sufer' por ni,
al la eterno iom pli.

La jar' forpasas en kviet',
la nova venas kun sekret'.

Ne scias la venonton ni,
sed gardas nin ja nia Di'.

La jaron enpaŝante, Vin,
Sinjor', ni petas: Benu ĝin!

Verkita de nekonata aŭtoro,
tradukita de M. Ratislavo el la
Germana

Jahreswechsel

Nun ist das Jahr zu End' gebracht
bis an die letzte Mitternacht,
hat uns gebracht viel Freud' und Leid
und näher an die Ewigkeit.
Das alte Jahr geht still dahin,
das neue schweigt im Anbeginn.
Wir wissen nicht, was kommt, was wird,
doch Gott ist unser guter Hirt.
So treten wir von neuem ein!
Herr, laß das Jahr gesegnet sein!

Nach einem unbekanntem Verfasser
Einsendung: Retzlaff



Veteran am Bahnhof

Herbsttagung in Ingolstadt

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk hielt auch in diesem Herbst – wie seit 31 Jahren – ihr Jahrestreffen in würdigem Rahmen ab. Vom 9. bis 11. Oktober 1987 waren über 90 Sprachfreunde, darunter Gäste aus Belgien, Bulgarien, Österreich, der Schweiz und der Tschechoslowakei sowie aus Ungarn Gäste der Donaustadt Ingolstadt. Im prächtigen Rathausaal gab Oberbürgermeister Schnell, selbst einer Eisenbahnerfamilie entstammend, in seiner herzlich gehaltenen Begrüßungsansprache einen Überblick über die geschichtsträchtige Stadt. Bei einem Rundgang durch die Altstadt konnten die Tagungsteilnehmer wenigstens einen Teil der sehenswerten profanen und kirchlichen Bauten besichtigen. Unter weißblauem Himmel machten die hellen Giebelhäuser in der Altstadt einen überaus freundlichen Eindruck.

Vorstand, Bezirks- und Sonderbeauftragte befaßten sich in den Arbeitssitzungen mit zahlreichen Themen, etwa einer Analyse der Aktivitäten anlässlich des hundertjährigen Jubiläums des Esperanto, dem Esperanto-Fernkurs, der Werbung,

der Übersetzung von Eisenbahnfachliteratur und des UIC-Fachwörterbuchs. Auch die Vorbereitung der nationalen und internationalen Veranstaltungen 1988 wurden besprochen. Herr Rother, der die Grüße des BSW-Hauptvorstandes überbrachte, verfolgte die Diskussion mit großem Interesse.

Am Festabend im Kolpinghaus konnte Herr Gießner, der Vorsitzende der Vereinigung, eine Reihe von Ehrengästen begrüßen, darunter Herrn Linke, Mitglied des BSW-Bezirksvorstandes München, Herrn Gerber von der GdL, Herrn Stadtrat Batz, die Ehrenmitglieder Frau Kruse, Herrn Walder und Herrn Dr. Bacskai vom Internationalen Verband der Eisenbahner-Esperantisten sowie Herrn Schmid, Vorsitzender der Bayerischen Esperanto-Liga. Die Vertreter der ausländischen Landesverbände überbrachten ihre Grüße. Das Streichquartett des BSW München und Gesangsdarbietungen der bulgarischen Konzertsängerin Maria Angelova trugen zur festlichen Gestaltung des Abends bei. Eine Tombola mit zahlreichen von den Teilnehmern gestifteten Gewinnen erbrachte einen erfreulichen Gewinn zugunsten der geplanten Ausgabe der übersetzten Eisenbahnfachwörterammlung. Anschließend vergnügte man sich gerne bei flotten Tanzweisen.

Ein Busausflug führte in das liebliche Altmühltal. Zunächst gab es die größte bayerische Buche zu bewundern, die in Hunderten von Jahren ein weit ausladendes Geäst entwickelt hat. Auf der Rosenburg bei Riedenburg ließen die Betreuer vor zahlreichen Zuschauern ihre Greifvögel in den sonnigen Herbsthimmel steigen. Mancher zog den Kopf vor den mächtigen Geiern und Adlern ein. Wem die anschließende Kaffeepause nicht so wichtig war, der betrachtete den größten Kristall der Welt. Ein gelungener Samstagnachmittag.

Die sonntägliche Matinee wartete mit einem gemischten Programm auf. Frau Kruse berichtete aus ihrer langjährigen Tätigkeit als Esperanto-Deligierte, die ihr Kontakte in aller Welt brachte, aber auch ihren Einsatz in vielen ungewöhnlichen Situationen erforderte. Sie entriß der Vergessenheit auch einen Esperanto-Marsch, der anschließend von Herrn Hönig

auf dem Klavier vorgetragen wurde. Herr Gießner appellierte in seinem Jahresbericht an die Anwesenden, sich verstärkt für die völkerverbindenden Ziele des Esperanto einzusetzen. Er stellte auch die Bemühungen der Eisenbahner-Esperantisten heraus, mit ihrem Tun kulturelle Werte zu schaffen. Herr Lautenbach führte einen bemerkenswerten DB-Film über „Das Jubiläumsjahr der deutschen Eisenbahnen“ vor und zeigte in einem weiteren Film „Schatzkammer Deutschland“ ausgesuchte Sehenswürdigkeiten. Nach dem gemeinsamen Mittagessen trat man die Heimreise an mit der Zusage, am nächsten Jahrestreffen in Kaiserslautern wiederum teilzunehmen. Für das Gelingen der Veranstaltung ist Herrn Lenz und seinen Helfern herzlich zu danken. W.B.

Anonco / Anzeige

EL POPOLA ĈINIO

Die optimale Esperanto-Zeitschrift

Die bislang beste Zeitung in Esperanto kommt aus China und heißt EL POPOLA ĈINIO. Sie erscheint 12x jährlich und informiert über Chinas Kultur, Städte, Sport, Landschaften und enthält auch Nachrichten aus der weltweiten Esperanto-Bewegung.

Das Jahresabo kostet 30,00 DM, für 2 Jahre 50,00 DM und für 3 Jahre nur 70,00 DM (über 2.500 Seiten). Jedes Heft hat über 70 Seiten mit vielen superscharfen Farbaufnahmen. Erste Lieferung aus China nach ca. 3 Monaten nach der Bestellung und dann immer pünktlich.

Gratisexemplar gegen Rückporto!

Bestellen Sie auch eine Bücherliste mit preiswerten und herrlichen esperanto-sprachigen Büchern aus China.

ZILVAR, Grubenhagenstraße 8

D-3420 Herzberg/Harz

(Telefon abends: 0 55 21 - 13 63)

Postgirokonton Hannover Nr.: 4411 76-304

Nachträglich gratulieren wir dem Nestor der Kopenhagener Gruppe Gunnar Hardrup zu seinem 95. Geburtstag, den er am 9. 7. 87 im Kreise seiner Familie und kurze Zeit darauf im Klub Kopenhagen feiern konnte.

Der stets gut gelaunte und kontaktfreudige Senior ist auch in unseren Reihen bekannt und beliebt.

Hannover/Bremen

Ekspozicio, en la Urba Biblioteko. Tutan monaton ni povis okupi montrofe-nestron en la urba biblioteko en la strato „Schüsselkorb“. Ni bone eluzis tiun ŝancon kaj instalis objektojn laŭ praktikaj vidpunktoj, kiel Esperanto kaj komerco, por antaŭokuligi la utilon de Esperanto. Favore estas, ke antaŭ la montrofenestro estas multe frekventita tramhaltejo.

Merkredon, la 14an de oktobro

Hellmut Grebe

ripetis - laŭdezire - sian januaran prelegon kun novaj lumbildoj pri

IMPRESOJ DE VAGADO TRA ĈINIO

sub la titolo „Laŭlonge de la silstrato“.

„Technik in den vergangenen Jahrzehnten“ Ein Vortrag von Kurt Meyer am 11. November.

„Zamenhof, Schöpfer der internationalen Sprache Esperanto“.

Vortrag von Herrn Friedrich Coburger vor der Polnisch-Deutschen Gesellschaft in Oldenburg am 5. November.

GEFA en radio

Lastatempe GEFA-membroj estas intervjuitaj plurfoje de radiostacioj, ekz. s-ino Kruse kaj s-ro Ullmann krome GEFA-prezidanto Gießner (okaze de la jarkunveno en Ingolstadt). La heslanda radiostacio Frankfurt raportis sub la titolo „Mondlingvo centjaraĝa“ dum unu horo pri Esperanto kaj precipe pri ĝia kreinto d-ro Zamenhof. La aktivaĵoj de la esperantistaj fervojistoj kaj ilia devizo „Reloj interligas landojn - Esperanto popolojn“ estas pozitive menciitaj. Du intervjuojn partoprenis Elisabeth kaj Gernot Ritterspach. Vi povis aŭdi ilin en „Rundfunk SWF 1“ kaj vidi en „Fernsehen, programo S 3“ kaj legi en la gazeto „Rheinischer Merkur“.

W. B. kaj Red.

1887 – 1987 = Hundert Jahre Esperanto Warum eine „Internationale Sprache“?

Kaum hatten die Menschen die Sintflut überstanden, mußten sie sich einen Wolkenkratzer bauen – ohne Baugenehmigung!

Die Folgen sind bekannt:
Da fuhr der Herr hernieder, daß er sähe die Stadt und den Turm, die die Menschenkinder bauten. Und der Herr sprach:
„Siehe, es ist einerlei Volk und einerlei Sprache unter ihnen allen und haben das angefangen zu tun, sie werden nicht ablassen von allem, was sie sich vorgenommen haben zu tun. Wohlauf, lasset uns herniederfahren und ihre Sprache daselbst verwirren, daß keiner des anderen Sprache verstehe.“

Ein Brasilianer z.B. (Brasilien ist um einiges größer als ganz Europa), der noch nie sein Land verlassen hat, bringt wahrscheinlich kein Verständnis auf für eine „internationale Sprache“ und hält die, die sich damit befassen, für Spinner; denn in seinem großen Land kommt man mit einer Sprache aus!
Reist er aber kreuz und quer durch Europa, dann sieht er die Bemühungen um eine internationale Sprache mit ganz anderen Augen an.

Archibald Lyall, ein Sprachwissenschaftler, brachte ein Buch über nicht weniger als 25 europäische Sprachen heraus. Dabei fehlen in Lyalls Sprachführer Sprachen wie Katalanisch, Provenzalisch, Baskisch, Gälisch, Ukrainisch, Slowakisch, Slowenisch, von Dialekten ganz zu schweigen.

Lyall hat die Sprache auf dreißig Sätze und achthundert Wörter reduziert. Das reicht natürlich nicht für einen Gedankenaustausch; aber 20 Liter Benzin, ein Butterbrot oder Briefmarken kann man damit bestellen.

Man möchte die im Sprachführer zusammengefaßten Sprachen natürlich nicht nur lesen, sondern auch sprechen. Lyall kam auf eine blendende Idee. Wie jeder weiß, ist die englische Sprache weit verbreitet, leicht erlernbar, fast eine „internationale“ Sprache (oder etwa nicht?). Er legte der phonetischen Schreibweise seines Sprachführers die angeblich so einfache eng-

lische Orthographie zugrunde.
Jeder kann nun folgenden Satz leicht lesen: „Vee highsst deezer plutz? Air ist sair shurn, nikht vahr?“ (Wie heißt dieser Platz? Er ist sehr schön, nicht wahr?) (Entnommen aus dem Buch „Der Kampf gegen Babel“ von Rónai.)

Welche Arbeitslast durch die vielen Sprachen entsteht, ist wahrhaft erschreckend. Wieviel Zeit, Energie und Geld steckt im Erlernen einer Sprache! Wieviel nützliche Dinge werden dafür nicht getan! Man kann zwanzig Sprachen erlernen, aber in einigen Ländern nützen selbst diese zwanzig nichts.

Warum hat man nun zur internationalen Verständigung eine neue Sprache ausgeklügelt, anstatt eine zu nehmen, die schon da ist?

Die Geschichte zeigt, daß die Nation, die die politische Vormacht hat, die Sprachen aller weniger starken Völker in ihren Bann zieht, genauer gesagt: überrollt, und daß die Sprache des Mächtigen als „Hilfssprache“ übernommen wird.

Wieviel Zeit und Energie braucht z.B. ein deutscher Wissenschaftler, bis er einem wissenschaftlichen Vortrag in Englisch folgen oder gar einen in Englisch selbst halten kann? Ein Land, das die „Ehre“ hat, daß seine Sprache als Hilfssprache benutzt wird, hat einen uneinholbaren Vorsprung auf allen wissenschaftlichen, technischen und kulturellen Gebieten.

Lassen wir deshalb alle lebenden und toten Sprachen beiseite und wenden wir uns dem Esperanto und seinem Schöpfer zu. Zamenhof, der Schöpfer der „Internacia Lingvo“, wie er sie selbst genannt hat, war eine außergewöhnliche Persönlichkeit von seltener Intelligenz und imponierendem Charakter. Seine Lebensgeschichte ist faszinierend.

Der Gedanke, eine übernationale Sprache zu schaffen, reifte schon in Zamenhofs jungen Jahren als Folge von Erlebnissen in seiner frühen Jugend. Zamenhof war Jude, wurde 1859 in Bjalistok (Polen, damals Rußland) geboren.

Der große Unterschied zwischen Zamenhof und den „Sprachschöpfern“ vor ihm war der, daß seine Vorgänger die Grammatik und das Vokabular ihres jeweiligen Sprachprojektes in die Welt setzten und warteten, wie sich die Sache entwickeln werde.

Zamenhof dagegen ging den umgekehrten Weg. Jahrelang probierte er selbst, wie die von ihm entwickelte Grammatik und das Vokabular funktionierten. Er übersetzte die Bibel, Werke der Weltliteratur, darunter Goethe, Schiller, Gogol u. a. Erst als er alles genau geprüft hatte, übergab er seine „Internacia Lingvo“ der Öffentlichkeit.

Es ist erstaunlich, wie trotz so eingehender mühevoller Arbeit ein derart einfaches und dabei vollkommenes Werk entstehen konnte. Aber wie oft in der Weltgeschichte sind geniale Erfindungen bestehend einfach!

Es wird empfohlen, vorstehenden Text, den unser Bezirksbeauftragte von Essen, Rolf Terjung, zur Verfügung gestellt hat, zu vervielfältigen und zur Information von Nichtesperantisten zu benutzen. Als Kontaktadressen können u. a. angegeben werden:

Hans-Jürgen Riehn,
Richard-Dehmel-Str. 3, 6700 Ludwigshafen
Deutscher Esperanto-Bund,
Lambertstr. 12, 6340 Bad Hersfeld
Deutsche Esperanto-Jugend,
Postfach 10 14 22, 2000 Hamburg

Norvega Fervojmuzeo

Tie riceveblas kajero en lingvoj norvega, angla, germana kaj Esperanto, 64- paĝa kun Ĉ 200 ilustraĵoj.

Ĝi estas eldonita de la apoga asocio; Jernbanemuseets Venner, kies nomo en Esperanto estas Amikaro de la Fervojmuzeo.

La prezo por la kajero estas NOK 10.— kun aldono de ankoraŭ NOK 10.— por sendkostoj, — entute NOK 20.—.

Tiu monsumon oni pagu al norvega poŝtbank-konto: 5 40 12 45.

Jernbanemuseets Venner, Postboks 248, N-2301 Hamar, Norvegujo.

Oni nepre menciui sur la pagila slipo, kiun ricevos la adresito, ke la enpagita monsumo estas anticipa pago por la gvidlibro.

von Seite 7

daß sie mit Esperanto viele Freundschaften in allen Winkeln der Erde schließen konnten und es sich daher auch heute schon lohne, die Sprache zu lernen.

Lieder in Esperanto wurden gespielt, Hörer riefen an und erhielten direkt über den Sender Auskunft über Esperanto und das Umfeld.

Rolf Köpke, der Moderator, verabschiedete sich in Esperanto.

Die Sendung hat allen viel Spaß gemacht.
Egon Kiefer

Esperanto-Informationsausstellung
in Offenbach

Die Stadt Offenbach veranstaltete am 12. und 13. September 1987 ein Straßenfest, zu dem alle ortsansässigen Vereine zur Repräsentation eingeladen waren. Die BSW-Esperantogruppe hatte aus diesem Anlaß unter dem Motto „100 Jahre Esperanto“ eine Ausstellung am Mainufer aufgebaut, die außer Werbematerial und Zeitschriften vom Roman zum Kochbuch alles enthielt, was die Esperantoliteratur zu bieten hat.

Reges Interesse, besonders bei jungen Leuten, fand auch die von dem Frankfurter W. Barnickel (BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt) in Esperanto übersetzte „Konvention über den internationalen Eisenbahnverkehr (COTIF)“.
Elfriede Kruse

München

Okazis ekspozicio „Alten al la lumo“ en la „Kassenhalle“ de la urbdomo inter la 11a de aprilo ĝis la 5a de junio, sub la temo „Arbeitsänger und Arbeitersportler“ antaŭ la jaro 1933, en kies kadro estis ankaŭ montritaj informoj pri la loka grupo.

40. IFEF-Kongreß vom 4. — 10. 6. 1988 In Perpignan (Frankreich)

Die ermäßigten Kongreßbeiträge (150 ffr) gelten bis 1. 2. 1988.

Anmeldevordrucke können beim Bezirksbeauftragten angefordert werden.

Redaktfino por n-ro 1/88 estas la 15. 1. 1988